

Karaj abonantoj de Retkomunikoj,

mi salutas vin en la nova jaro 2019 kun deziroj de ĉio bona.
Ĉi-sube mi trovos la ĉefajn interretajn novaĵojn de la lastaj 6 semajnoj.
Ĉar Miro Hruška pro pluraj kialoj rezignis pri funkcio en la ĈEA-estraro kaj ne plu aktivis en la retejoj Esperanto.cz (inkl. FB) kaj mi kiel kunredaktoro ne laboras en la programo Mailchimp kaj mem ankaŭ bezonas limigi miajn ĝisnunajn laborojn, mi klopodas dissendi la informojn almenaŭ en tiu ĉi simpla formo (fakte simile kiel la *Retkomunikoj* aspektis origine).
Estus ĝojige, se iu el vi pretus transpreni almenaŭ la teknikan redaktoradon (se entute estas publika bezono de tio!).

1. AKTUALAĴOJ EN ESPERANTO.CZ

Ni komencas bedaŭrinde per trista anonco pri forpaso de la honora membrino de ĈEA, en 1999-2005 ĈEA-prezidantino

Zemřela Věra Podhradská (5.2.2019)

(*ĉeĥlingve, sed kun ligilo al nun kompletigita [biografia wikipedia artikolo en Esperanto](#) kaj al esperantlingvaj artikoloj de ŝi verkitaj*)
la adiaŭa ceremonio okazos 12.2. en Brno
estis almetita ankaŭ adreso por kondolenco, por tiuj, kiu ne partoprenos

Rozhovor o tzv. Braillově písmu na ČT1

interparolo kun Jan Příborský, prezidanto de la Sekcio de nevidantoj de ĈEA (*ĉeĥlingve*)

O esperantu v českých médiích na přelomu 2018/2019

11.1.2019 (*Pri Esperanto en ĉeĥaj amaskomunikiloj - ĉeĥlingve*)

Multmediaj novaĵoj verkitaj de ĈEA-membroj 19.1.2019

por tiuj, kiuj jam malfermis la liston: estis nove almetitaj ligiloj al prelego pri *Aŭtorrajtoj/Kopirajto* kaj al al konkursa filmo de P. Kašćák kaj de la ensemblo DOMA al la filma festivalo en Ĉinio

KALENDARO DE ARANĜOJ

en la ĉeĥa versio bv. rimarki [Printempan Seminarion en Skokovy](#) (3.-7.4.), [SES en Nitra](#) (12.-20.7.)

kaj [Schulhof-Tagon en Pardubice](#) (21.9.).

La plej proksima estas la aranĝo [BESTĜARDENO](#) en Prago (16.2.).

En la esperanta versio ni alŝutis informojn pri la [104-a Universala Kongreso en Lahti](#)

kaj pri la [55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj](#) en Panevežys (Litovio).

Tiun ĉi aranĝon ni speciale rekomendas ankaŭ **kiel event. taŭgan alternativon de UKo** (internacian, buntprograman kaj bonkvalitan, tamen pli kameretosan kaj malpli koston kaj pri proksiman).
Jam 4 ĉeĥaj esperantistoj aliĝis. Interesitoj bv. kontakti nin nedevontige ĉe la indikita adreso!

NI ATENDAS INFORMOJN PRI PLUAJ ARANĜOJ OKAZONTAJ EN ĈEĤIO!

**NI PETAS ORGANIZANTOJN DE ARANĜOJ
SKRIBI ĜUSTATEMPE INFORMOJN AL
REDAKCE@ESPERANTO.CZ**

tiel disponeblas informoj kaj por Esperanto.cz, kaj por Starto kaj Facebook, ev. ankaŭ por la muzeaj retejoj.

**INTERESITO PRI PRIZORGO DE LA KALENDARO DE ARANĜOJ
EN ESPERANTO.CZ ESTAS SERĈATA!**

2. ELEKTO EL INFORMOJ EN [ESPERANTO.CZ](http://esperanto.cz) ĈE FACEBOOK

(krom tiuj rilataj al la retejo Esperanto.cz mem)

nuntempe kontribuas Libuše Hýblová, Matěj Nárožný kaj Pavla Dvořáková

**1. Atentigo pri la nova retejo uea.facila.org
kun artikoloj en simpla lingvaĵo - NI REKOMENDAS!**

2. Ebleco konatiĝi kun la gazeto *Revuo Esperanto*
pere de [senpage elŝutebla decembra numero](#)

3. Ofertoj de UEA_Libroservo
libro de E. Csiszár - "[Dulingve - pli simple](#)" (pri dulingva edukado de infanoj)
- (dum februaro triona rabato de la kutima prezo sendepende de la kvanto - 3,20 Eŭroj)

4. Ebleco elŝuti senpage al via portebla telefono la ***ludan aplikajon Padající písmena***
- [FALANTAJ LITEROJ](#), kreitan de Andrej Repisky, pere de kiu vi povas praktiki Esperanton

**5. Informo pri kreo de nova fejsbuk-grupo
[Ĉeĥa Esperanto-Movado](#)**
(dume aliĝis 49 personoj - bonvenas ankaŭ vi!)

3. NOVAĴOJ ĈE LA MUZEA PAĜO EN IPERNITIO

4 literaturaĵoj okaze de datrevenoj:

1) retligiloj al ĉeĥa-Esperanta spegula teksto kaj sonregistraĵoj de 48 "[Rakontoj el la unua poŝto kaj el la dua poŝto](#)" de Karel Čapek (omaĝe al 80-jariĝo de lia forpaso - 25.12.1938)

2) leginda poemo "[Mi ĵetas](#)"
omaĝe al forpaso de la islanda poeto kaj tradukisto [Baldur Ragnarsson](#) (26.12.2018)

3) Elŝutebla romano "[Ombro sur interna pejzaĝo](#)"
omaĝe al la vivjubileo de kroata verkistino [Spomenka Štimec](#) (11.1.1949)

4) Fama parabolo "[Fabelo de la tri ringoj](#)" el la drama poemo "Natan la Saĝulo" de G.E. Lessing (ligilo kaj Ipernitia, kaj por nemembroj)
- omaĝe al vivjubileo de la aŭtoro (naskiĝis la 22-an de januaro 1729)

5) La 21-an de januaro 2019 pasis 20 jaroj de post forpaso de la aktorino [Eva Seemannová](#)

- rememore pri ŝi ni ofertas al vi el nia Ipernitia kolekto dosierojn jam antaŭe alŝutitajn:

- ŝian voĉon deklamantan la poemaron de Eli Urbanová "[Verso kaj larmo](#)" (eld. Iltis 1986)

- fragmentojn de ŝia traduko "[El leteroj de Božena Němcová](#)" (sonregistraĵo kaj teksto)

4. Listo de Novaj sonartikoloj en la Esperanta Retradio

ĉiutage nova sonartikolo kun akompana teksto pri alia interesa temo!

Bv. informi nin ĉe la adreso redakce@esperanto.cz pri viaj aktivecoj aŭ pri interesaj dosieroj aŭ projektoj, kiujn indus diskonigi!

**Krome kunredaktantoj estas serĉataj! Mi volonte klarigos ĉion necesan!
Alikaze la informado ekde nun bedaŭrinde okazos mapli ofte kaj malpli bunte.**

Amike salutas ĉiujn Pavla Dvořáková

P.S. Tre gravas via reago al la legitaĵoj - kio por vi estis unteresa kaj utila, kio ne, kion vi bonvenigus, per kio vi povas mem kontribui aŭ helpi.
Ne hezitu kaj skribu al la redaktea adreso! Ni ĉiuj laŭ niaj eblecoj kontribuu al la komuna celo!